

Ni daŭrigu kongresi en landoj, kiuj malrespektas homajn rajtojn ! UEA restu neŭtrala, sed aktiva !

Rezultoj kaj konkludoj el enketo farita inter la UEA-delegitoj

Spegulo prezentas la rezulton de privata enketo inter la UEA-delegitoj, kiun Andreas Künzli, Fakdelegito de UEA (Bern), efektivigis en printempo 2010 inter la delegitaro de UEA pri la kelkaj demandoj lige kun la ‚Homaj Rajtoj‘, inter alie rilate al la ĉijara kongreslando Kubo, kaj la neŭtraleco de UEA. Ni ne nur sciigas la statistikan ciferan rezulton de la enketo pri jeso kaj neoj, sed aldonas kompile ankaŭ la plej interesajn komentojn de la respondintoj, kiuj celis klarigi aŭ pravigi kial ili voĉdonis jese aŭ nee pri tiuj konkretaj demandoj (la originala teksto de la respondoj estas kiel eble plej multe konservita, sed iom polurita lingve kaj gramatike).

Unua demando:

Ĉu vi konsentas (apogas) la okazigon de la Universala Kongreso de Esperanto en Kubo (en 2010), malgraŭ tio, ke la Homrajta Konsilio de UN en Ĝenevo kritikas la registaron en Havano pro drasta malrespekto de la homaj rajtoj (laŭ tiu ‚verdikto‘ de kompetenta instanco, ni do baziĝu je la kredo, ke en Kubo la homaj rajtoj objektivite estas draste malrespektataj) ?

Jesis 133, neis 34 respondintaj delegitoj. Tio signifas, ke la granda plimulto apogas la okazigon de UK en Kubo, malgraŭ la konataj homrajtaj problemoj.

Kelkaj komentoj kaj pravigoj de respondintoj (a, b, c ... signifas la opinion de diversaj respondintoj rilate la saman temblokon):

- a Mi apogas la okazigon de UK en Kubo, malgraŭ ties politika reĝimo. b Rilate la okazigon de UK en Kubo mi persone ne kontrŭstaras, ĉar alie oni plulasos en la ombro kaj senhelpe almenaŭ spirite la popolon de Kubo. c Tiaspecaj aferoj havas du flankojn: jes, oni malrespektas la homajn rajtojn, sed pri tio ne kulpas ordinaraj e-istoj, kiuj pro monaj, vizaj k.a. aferoj ne povas movadumi internacie - do, por ili tio estas unika kazo ĉeesti la movadan feston. d UK-oj okazadas por esperantistoj ne por subteni aŭ malsubteni registarojn. e Fermita socio bezonas kontaktojn por estontaj ŝanĝoj. f Jes, alie estus eraroj ankaŭ kongresi en Varsovio, Sofio, Budapeŝto. f Ja kubanoj havas homan rajton akcepti kaj ĝui UK-ojn; aliflanke Usono malrespektas homajn rajtojn de usonaj esperantistoj, malpermesante al ili viziti la UK-on en Kubo.
- a Per la kongreso en Kubo ni apogas la agadon de esperantistoj tie. b Ni kongresas en la koncernaj landoj por apogi la individuojn, la homojn, do kongresado en certa lando ne signifas, ke ni subtenas ties politikon. c UK ne estas subteno al registaro sed al la lokaj esperantistoj. d Kubanoj tre bezonas tiun ĉi okazon. E Tia kongreso donos respekton kaj fidon je laboro de kubaj esperantistoj. e Grave montri al la mondo, ke en Havano ekzistas homoj, kiuj subtenas la respekton por la mondo kaj la homoj.
- a Jes, kondiĉe, ke oni utiligos la okazon por diskutigi la kongresanaron pri la demando rilate al la kongres-lando. b La veno de eksterlandanoj al Kubo ebligas,

ke ekestos diskutoj pri la situacio de Homaj Rajtoj en Kubo. c Tiam estos bona okazo organizi kelkajn prelegojn ekzemple en la kadro de la Kongresa Universitato pri al demando de homaj rajtoj kaj kio estas la homaj rajtoj. d Mi protestus, respektive estus malgaja, se en la programo ne estus atentita la situacio de homaj rajtoj en Kubo.

- a La kongresado ne signifas, ke oni silentas pri la homrajtaj problemoj. b La homrajta rompo estas portempa, sed la Esperanto-komunumo estas eterna. c Se ni konsideros nur landojn, kie la homaj rajtoj estas (relative) bonaj, por UK-oj restus tro malmulte da lokoj.

- a Mi mem ne estas amiko de kuba registaro, sed se UEA elektus kongreslandon laŭ homrajta situacio, malmultaj landoj rajtus gastigi kongreson, bedaŭrinde - Certe ecx ne mia propra loĝlando Usono ! b Laŭ mi, UEA eĉ povus okazigi kongreson en Usono, kvankam mi mem rifuzus viziti tiun landon. c Kubo estas relativa anĝelo kompare al landoj samkiel Usono, inter aliaj.

- a Iuj ajn ŝtatoj havas problemojn pri homaj rajtoj en diversaj formoj. b Se preni malrespekton al homaj rajtoj je strikta senco, kaj se tio malrekomendus okazigon de UEA-eventoj, tiam tre malmultaj landoj en la mondo meritis la ĉeeston de UEA.

- a Mi neniel apogas kaj tute ne komprenas la agon de UEA. Jam la fotoj pri Kubo en la revuo estas belega mensogo... Aldone: tio estas, kiel ĉiam, nura turismado !!!

- a Verdikto de UN ne estu ordono por UEA, escepte ke ne eblus certigi la sekurecon de la gekongresanoj. b Rimarku ke tiuj konceptoj pri homaj rajtoj kelkfoje estas subjektivaj kaj nia distanciĝo nur vekos malamajn sentojn ekde la suferanta popolo. c Bv. memori ke la mondo ne estas blanka/nigra kaj ke multaj landoj/sistemoj ne komprenas demokration/'homajn rajtojn'; ĉu 'la Eŭropa-modelo' estas *la solvo* por ĉiuj popoloj aŭ ĉu estas alia vero same taŭga en la antikvaj aziaj filozofioj. Do, la demando estas malbone formulita; ĝi devas esti jene formulita: Ĉu vi konsentas, ke la blokado de Usono al Kubo dum preskaŭ jam 50 jaroj estas atenco kontraŭ Homaj Rajtoj ? Multaj opinias, ke la blokado estas la plej granda perforto farita je la nomo de 'Homaj Rajtoj' al la homaj rajtoj de kubanoj disde la usona registaro.

Dua demando:

Ĉu vi konsentas (apogas), ke UEA ankaŭ en estonto okazigu Universalajn Kongresojn de Esperanto en landoj, kiuj havas, laŭ la kriterioj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, drastajn problemojn kun homaj rajtoj, kiuj profunde kontraŭdiras tiun Deklaracion en multaj punktoj (temas pri evidenta sistema subpremado de civitanaj rajtoj, bazaj liberecoj, opoziciemaj naciaj malplimultoj, la demokratio, kie ekzistas ne malmultaj politikaj malliberuloj, kie ekzistas la mortpuno au kie la homoj amase malsategas kaj malsanegas) ?

Jesis 122, neis 47 delegitoj. Tio signifas, ke la granda plimulto konsentas, ke UEA ankaŭ en estonto okazigu Universalajn Kongresojn de Esperanto en landoj, kiuj havas, laŭ la kriterioj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, drastajn problemojn kun homaj rajtoj.

Kelkaj komentoj kaj pravigoj de respondintoj (a, b, c ... signifas la opinion de diversaj respondintoj rilate la saman temblokon):

• a Preskaŭ ĉiuj landoj - eble ĉiuj - malrespektas homajn rajtojn ‚laŭbezone’ - ideala lando ne ekzistas. b Kiu ŝtato vere respektas homajn rajtojn ? UEA kaj UK estas por la homoj kaj ne por ŝtatoj, tiu de 2010 kaj aliaj kongresoj subtenas nian movadon en la koncernaj landoj. c Homaj rajtoj estas draste neglektataj en minimume $\frac{3}{4}$ da landoj de la mondo; d El la 95 organizitaj kongresoj, nur proksimume 40 okazis en landoj tiam respektantaj la kriteriojn pri homaj rajtoj (respondinto kompilis komentitan liston de ĉiuj UKoj); e ‚Homaj rajtoj’ ofte estas preteksto, kiun uzas okcidentaj ŝtatoj por

trudi sian politikan sistemon al aliaj landoj.

- a Kongreso en difinita lando ne signifas apogon al ĝia politiko, la kongreso povus roli ankaŭ kiel ilo por pensigo pri homaj rajtoj, ŝanco de partopreno kaj nekontrolata kontakto de la landanoj kun alipensantaj homoj; propagando de ekstere apenaŭ utilas.

- a Nepras, ke esperantistoj spertu totalismojn kaj provu kontaktiĝi kun esperantistoj, kiuj devas plu vivi en totalismaj landoj. b Rifuzo kongresi ie pro subprema registaro duoble punas kaj kondamnas la enlandajn esperantistojn. Ni kongresu ofte en tiaj landoj, por helpi kaj subteni tiujn esperantistojn, kiuj portas niajn idealojn en la plej malfacilaj kondiĉoj. Kiam Castro (aŭ Aĥmadinedĵad) atentis kaj agnoskas nian kongreson, ni influas ilin. Ili havas siajn celojn, eble fiajn, kiam ili akceptas nin. Malgraŭ tio, ni havas multe pli grandan influon super ilin, kaj ilian registaron ol eblus laŭ alia elekto nia. Tio estas la komenco de komunikado, de dialogo. c Mi konscias, ke ne estas facile pretervidi la misrespekton de homaj rajtoj, sed rompi rilatojn kun lando signifas ankaŭ malhelpi kontakton kun unuopaj homoj. Tiajn UKojn tamen povas faciligi la rilatojn. d La popoloj en tiuj landoj estas ‚punitaj’ de siaj registaroj; ni duafoje punigus ilin, se ni forlasos ilin; mi mem loĝas en ekssocialisma lando kaj scias kiom malfacile estis kontakti eksterlandanojn; mi mem sentis Esperanto-n kiel ‚fenestron’ al la mondo. d Tio nepras, por ke la esperantistaro povu resti solidara; ni ne punu esperantistojn pro la fiagoj de politikistoj ! e Renkontoj kun eksterlandanoj ĉiam lezas la aŭtoritatan regimon; f Mi jam dufoje iris al Kubo kaj tio ebligis paroli kun esperantistoj kaj disvastigi ideojn pri homaj rajtoj; la homoj tiam sentas sin malpli izolitaj; la samon mi konstatis, kiam mi multfoje vojaĝis malantaŭ la fera kurteno; mi tiam alportis subtenon al la homoj sen homaj rajtoj. g Malsanuloj bezonas kuraciston !

- a Mi supozas, ke irakanoj, afganoj, irananoj, palestinanoj (alitempe ĉinoj, vietnamoj, koreoj, libianoj, ĉilianoj, nikaragvanoj kaj aliaj ribeluloj pensas, ke laŭ via sama kodo pri Homaj Rajtoj UEA devus malpermesi aŭ eviti kongresojn en Usono, Britio, Israelo kaj aliaj eŭropaj aliancanoj, kiuj ŝajnas alpreni al si mem la rajton perforti homajn rajton, kiam tio konvenas por iliaj ekonomiaj kaj politikaj interesoj. b Imagu ekzemple postuli la rajtojn de kovritaj muzulmanaj virinoj en Francio, samseksemaj geedziĝoj en Saŭdarabio, nuligon de la mortpuno en Ĉinio, liberigon de politikaj prizonanoj en Usono, ŝanĝon de diskriminacia elektosistemo en Bosnio, ĉeson de israelaj persekutoj kontraŭ araboj, aŭ demokratiajn elektojn en Monako. c En Svislando multaj homaj rajtoj estas tre pli forte malrespektataj (ol en Kubo). d Ankaŭ en Usono aŭ Francio oni trovas drastajn problemojn kun homaj rajtoj, ekz. Guantanamo, meksikia muro, atombombaj provoj. brulantaj antaŭurboj en Francio, k.s.;

- a Laŭ tiu kriterio ni povus kongresi nenie. b Multaj landoj ne taŭgus por kongreso de UEA; ni ne devas postuli ian perfektecon de la invitanta lando, sed la sekurecon de la partoprenantoj estu garantiata; c Mi ne konsentas, ke UKoj okazu en Usono, kie ekzistas mortpuno, kaj do en la landoj lakeaj al Usono, kaj en monarkioj kiel brita, dana kaj aliaj. c Mia nuna loĝlando (Usono) decidis nuligi la homan rajton de siaj civitanoj veturi kien ajn ili volas por kiu ajn celo.
- a Mi pensas ke esperantistoj, kiuj ne subtenas la politikon de iu lando, simple ne iru al tiu lando. Ekzemple Ĉinio, Israelo, Usono sed tamen oni povus okazigi kongreson por stimuli la evoluigon (mensan) de la tiea esperantistaro;
- a Mi tamen kontraŭas serĉi la subtenon de la ŝtatestro kaj de la ŝtato entute. b Laŭ mi, organizo de kongreso en lando estas iamaniere apogo de la reĝimo de tiu lando.

Tria demando:

Ĉar laŭ sia statuto UEA defendas la homajn rajtojn, ĉu laŭ vi UEA devus videble (publike) admoni (postuli) la respektadon de la homaj rajtoj en la koncernaj landoj tra siaj Landaj kaj Fakaj Asocioj, eĉ se tio kontraŭdirus la neŭtralecon de UEA ?

Jesis 80, neis 82 delegitoj. Ĉi tiu rezulto montras, ke po preskaŭ la sama kvanto de respondintoj mal/apogas la ideon, ke UEA devus videble admoni aŭ postuli la respektadon de la homaj rajtoj en la koncernaj landoj (eventuale tra siaj Landaj kaj Fakaj Asocioj).

Kelkaj komentoj kaj pravigoj de respondintoj (a, b, c ... signifas la opinion de diversaj respondintoj rilate la saman temblokon):

a Ne, ĉar por la koncernaj Landaj Asocioj tio egalus al mortiga verdikto; b Almenaŭ UEA ne, sed individuaj anoj de UEA devas admoni; c UEA devas alpreni vidpunkton rilate la respekton de homaj rajtoj, sed UEA ankaŭ devas klare esprimi, ke ne estas la rolo de UEA ŝanĝi la politikon de iu lando. d UEA ne ekzistas por tio; sed ĝi ne devas ‚morale‘ apogi registarojn malrespektantajn homajn rajtojn; aliflanke, tio estus bona bazo por forigi la ‚neŭtralecon‘ de UEA; e Ne rekte UEA, sed ekzemple pere de siaj fakaj organizaĵoj aŭ komisionoj; f Jes kaj ne: nur se tio ne endanĝerigus la lokajn esperantistojn; g Ne estas nia tasko fariĝi polico kaj juĝsto pri individuoj aŭ ŝtatoj; Ni rifuzu juĝi pri iu ajn, kaj tamen ni subtenu homajn rajtojn ĉie, ĉiam; per tiu starpunkto, ni foje povos komuniki kun problemaj registaroj, kaj per komunikado ni foje atingos ion bonan; h Mi suspektas, ke tia agado malhelpus atingi la ĉefajn celojn de UEA. Estas multaj aliaj forumoj por admoni kaj postuladi homajn rajtojn; i Jes ĝi devus fari tion eĉ pli aktive kaj vigle, ekzemple postulante la respektadon de la homaj rajtoj (la lingvaj, kiujn ĝi koncernas); tio ne nur kontraŭdirus, sed inverse estus apliko de ĝia neŭtraleco; i Preferinde ne enmiksiĝi en politikon, tamen eviti tiujn landojn. j Jes oni draste kritiku, sed ne forgesu la homojn en la lando. k UEA (kaj TEJO) ne devus timi trakti la temon homaj rajtoj, sed ne nepre riproĉu la landojn; la du organizoj povas tamen pli insisti pri homaj rajtoj, kiam UK okazas en tia lando, sen rekte mencii la landon; la asocio estas nur politike neŭtrala, kaj oni ne konduku la neŭtralecon ĝis absurdo; l UEA ne havas la rajton tion fari; nia movado estas, kiel vi mem diris, neŭtrala; m UEA devas resti neŭtrala, almenaŭ politike kaj religie. n UEA devas kontraŭi la mortpunon en Usono; n Jes nepre kaj prudente; o La demando pri la homaj rajtoj en si mem ne estas politika, do ne tuskas la neŭtralecon; p La fakto, ke UEA defendas homajn rajtojn ne faras, ke ĝi

estu respondeca pri malrespekto al homaj rajtoj en iuj landoj; UEA ne povas morale alĝustigi la mondon, sed nur kontribui por tio per sia lingvopolitiko; r Tiu ne estas nia ĉefa tasko; ni protestu pro la malrespekto de lingvaj homaj rajtoj. s La ‚admono‘ de registaro pere de malgranda organizo kiel UEA povus meti la esperantistojn de tiu lando en dageron; t Rezulte, landoj kiel Irano aŭ Kubo malinvitus la UK-on; u UEA ne estu neŭtrala rilate de homoj rajtoj kaj kuraĝe, ofensive parolu pri tio, kondiĉe, se temas pri ĉiuj ŝtatoj, kiuj ne konsekvence sekvas la tiujn leĝojn; sed nek UEA nek ĝiaj fakaj asocioj tro alte taksu siajn potencojn. V Mi pensas, ke UEA devas nek kritiki, nek apogi tiajn reĝimojn.

4. Ĉu vi vidas kontraŭdiron inter la (politika) neŭtraleco de UEA kaj la emfazo de la homaj rajtoj fare de la sama UEA ?

Jesis 50, neis 112 delegitoj. Tio signifas, ke la plimulto de la respondintoj ne vidas kontraŭdiron inter la neŭtraleco de UEA kaj la emfazo de la homaj rajtoj.

Kelkaj komentoj kaj pravigoj de respondintoj (a, b, c ... signifas la opinion de diversaj respondintoj rilate la saman temblokon):

A Ne, ĉar homaj rajtoj estas universala nocio; nur la trakto de la termino diferenciĝas. b UEA devas havi kuraĝon alparoli kaj defendi kaj pretendi la respekton de la homaj rajtoj: neŭtraleco ne signifas silenti; c Mi pensas, ke oni ne perdas sian neŭtralecon, ĝenerale subtenante universalajn homajn rajtojn; ja ĉiuj landoj pretendas konsenti pri preskaŭ ĉio en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj; d Foje la kontraŭdiroj en la homa vivo ne estas eviteblaj; e UEA povas emfazi, propagandi homajn rajtojn, sed ne agadi; f Teorie, ĉiu politika kaj religia sistemo povas respekti la individuajn rajtojn-devojn; praktike, neniu povas tute respekti ilin; f UEA estu neŭtrala, ekzemple pri religio kaj politika konvinko, sed ne pri homaj rajtoj ! g Ni ne povas transformi nian movadon en politikan batalon; mi pensas, ke politika reĝimo estas afero de la popolo kiu vivas sub ĝi.

5. Ĉu vi komprenas kion UEA celas diri per ‚Lingvaj Rajtoj‘ ?

Jesis 125, neis 37 delegitoj. Ĉi tiu rezulto signifas, ke la plimulto de la respondintoj konfirmis, ke Lingvaj Rajtoj laŭ la kompreno de UEA estas kompreneblaj. (Tamen multaj jesintoj ne certis aŭ eĉ iom dubis. Speciale menciindaj komentoj ne estis).

La enketilo estis senditaj perrete al ĉirkaŭ 1300 individuaj delegitoj kun retadreso (sen la kluboj) de la Jarlibro de UEA de la jaro 2008. La identeco de la respondintoj restas anonima. Respondis entute 172 delegitoj (hazardaj respondoj de ne-delegitoj ne estis konsideritaj), kio egalas al 13 procentoj. Kelkaj respondintoj aldonis komenteton aŭ relativigis sian jeson aŭ neon. Ĉe la demando 1 oni povis legi ekzemple la respondon, ke ĉiuj landoj malrespektas ka homajn rajtojn kaj ke Kubo bezonas eksterajn rilatojn. Alia skribis, ke oni draste kritiku la malrespekton de la homaj rajtoj, sed ne forgesu la homojn en la lando. La logiko de la respondoj en ĉi tiu enketo konfirmas iusence la logikon de la respondojn de la enketo farita de A. Künzli en 2006, en kiu la enketitoj devis respondi, ĉu ili kredas je la „fina venko“ de Esperanto.¹

¹ De la siatempe 180 respondintaj delegitoj 105 personoj (72 viroj kaj 33 virinoj) au 58,3% jesis la demandon „Ĉu vi kredas je la fina venko?“, dum 50 personoj (34 viroj kaj 16 virinoj) au 27,8% neis ghin. La resto ne povis au ne volis klare kaj definitive respondi tiun demandon aŭ rifuzis doni respondon.

En ĉi tiu enketo estis konstatebla la observo, ke el multaj landoj respondo al la enketo ne venis, ekzemple el Kubo (sed ne nur), krome ke la UEA-estraranoj kaj pluraj gvidaj personoj en UEA, kiuj samtempe estas delegitoj de UEA, ne respondis la enketon.

La enketo mem estis ĝenerale bone akceptita ĉe la respondintaj delegitoj. Oni opinias, ke estas utile havi informojn pri kion la delegitoj pensas aŭ subtenas, kiel mezurilo de la averaĝa opinio de la aktiva esperantistaro. Dum iu respondinto rimarkigis, ke tiaj enketoj estas malnecesaj kaj eĉ malutilaj, ĉar provokaj, alia respondinto opiniis, ke tiaj enketoj estas nepre necesaj, ĉar ili helpas nin vidi nin mem. Sed unu respondinto ankaŭ pensas, ke enketoj ne multon donas. Jen kelkaj aliaj komentoj laŭ la supre aplikita skemo:

a Tiaj enketoj estas ĉiam interesaj kaj bonvenaj, sed tamen kondiĉe, ke ili havas sian daŭrigon, tio signifas, ke oni tiru el ili praktikajn konkludojn por la ordinara agado; se plejmulto da delegitoj ne emas respondi tiajn enketojn, tiukaze ne plu valoras fari ilin; b Utilaj, sed ili estos preterlasitaj de UEA kaj gravaj komunikrimedoj de la movado, se ili enhavas ‚nekonvenajn‘ rezultojn; c Verdire mi ne ŝatas enketojn, se oni nur rajtas respondi per jes aŭ ne, sed mi volas kunlabori, do aprobas la regulojn; d Mi subtenas la ideon de enketoj, sed mi preferus ke la demandoj en ajna enketo estu pli neŭtralaj en la vortumo, ĉar mi opinias ke la nuna vortumo influos la respondojn de multaj. d Normale oni eĉ ne bezonas respondojn, ĉar oni antaŭscias la rezulton; e Ne ĉiuj enketoj estas kompilitaj profesie, ankaŭ la via de la vidpunkto de la sociologia scienco estas tro amatora; f La demandoj en ĉi tiuj enketoj estas kompleksaj; ĉiu ajn respondo ‚jes‘ (absolute ĉiam) aŭ ‚ne‘ (en absolute nenia ajn cirkonstanco) entenus absurdaĵojn. Eble estus pli utile havi elekton pri kiom oni konsentas pri diversaj sintenoj aŭ kiom la faktoroj influas nian decidon veni al la kongreso aŭ iel subteni ĝin; g Simple respondi ‚jes‘ aŭ ne tre malfacilas, ĉar ekzistas komplikaj problemoj malantaŭ la aferoj. h Tre bona ideo, plaĉis al mi via demandaro, ĉar ĝi elvokas la opinion de la respondanto; sed tiu strebado al ‚pureco‘ de UEA pri antaŭkondiĉoj de UK ŝajnas al mi tre ege hipokrita. i Finfine, unu respondinto aldonis, eble ironie, ke li kredas nur tiujn statistikojn, kiujn li mem falsis.

Ĉu tiu ĉi enketo enhavas ‚nekonvenajn‘ rezultojn, juĝu la legantoj mem.

Kvankam tendenco estas videbla, sed ĉar 570 enketitoj ne respondis (ne reagis), definitiva pritakso de tiu ĉi demando estas malfacila aŭ neebla (vd. *La Ondo de Esperanto*, februaro 2006, p. 12).